

HO CHI MINH – komunisma ikono kun multaj nomoj, vizaĝoj kaj roloj

Senlegenda biografio de la vjetnama revoluciulo Nguyen Sinh Cung aŭ Nguyen Tat Thanh aŭ Nguyen Ai Quoc

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli

Ho Chi Minh kiel junulo

Kiam la homo Nguyễn Sinh Cung – pli poste konata kiel Hồ Chí Minh – naskiĝis la 19an de majo 1890 en Kim Liên, vilaĝo de la provinco Nghệ An en nord-centra Vjetnamio, la regiono troviĝis sub la kontrolo de la francaj koloniistoj kaj nomiĝis Hindoĉinio. La franca kolonio en Azio konsistis el tri landoj: Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo; Vjetnamio mem konsistis el la partoj Tonkin (nordo), Annam (centro) kaj Koĉinĉinio (suda). La provinco Nghe An estis konata ne nur pro la naturaj katastrofoj, kiuj tie regule okazis, sed ankaŭ pro la vigla kontraŭkoloniisma sinteno de la loka popolo. La patro de Nguyen Sinh Cung, Nguyen Sinh Sac (1863-1929), estis tre diligenta homo. Li edziĝis al unu el la filinoj de sia instruisto. Nguyen Sinh Cung havis unu fraton kaj unu fratino. En 1895 la familio translokiĝis al Huế, la sidejo de la Nguyễn-dinastio kaj praktike la ĉefurbo de Vjetnamio inter 1802 kaj 1945. Tie la patro preparis sin por la profesia ekzameno, sed dufoje li malsukcesis kaj pro tio restis instruisto. Kiam lia edzino Hoang Thi Loan forpasis en 1901, la patro rekondukis sian familion al Nghe An. Tie la patro finfine sukcese trapasis la ekzamenon, sed li montris nenian intereson por kunlabori kun la francaj administrantoj kaj daŭrigis sian malnovan okupon kiel instruisto. Komence de la 20a jarcento, la patro ŝanĝis la denaskan nomon de sia filo, al kiu li donis la novan nomon Nguyễn Tất Thành (kio signifas: “Nguyen, kiu certe estos sukcesa”). Nguyen Tat Thanh konatiĝis kun la junulo Phan Boi Chau, kiu organizis la reziston kontraŭ la francaj okupantoj. Phan estis konviktita, ke oni devas forpeli la francojn kun la helpo de la japanoj kaj klopodis konvinki Nguyen Tat Thanh, ke iru kun li al Japanio. Sed Nguyen Tat Thanh rifuzis tiun proponon, ĉar li havis alian planon: Li intencis serĉi la kontakton kun la Okcidento, kun Eŭropo. Pro tio en 1905 li komencis lerni la francan lingvon, samtempe ankaŭ la ĉinan. En 1908 eksplodis ribelo pro la postulo de tro altaj impostoj. Nguyen Tat Thanh subtenis la protestantajjn kamparanojn kiel tradukisto en ties intertraktoj kun la francoj. Post kiam ili fiaskis, Nguyen Tat Thanh fuĝis kaj baldaŭ plumigris al suda Vjetnamio por serĉi laborlokon. Kiam lia patro perdis sian statuson kiel mandareno, li iris al Sajgono, kie li vendis ĉinan medicinon. Nguyen Tat Thanh sekvis lin komence de 1911 al Sajgono, kiu estis konsiderata kiel la pordego al la ekstera mondo.

De Sajgono al Parizo

Kun la nomo “Ba” Nguyen Tat Thanh estis dungita en junio 1911 sur la ŝipo ‘Amiral Latouche-Tréville’, kiu transportis lin al Francio. En Marsejlo li unufoje vidis tramojn, kaj oni alparolis lin per “sinjoro”, kio igis lin konstati, ke la francoj en Francio estas pli bonaj ol la francaj koloniistoj en Hindoĉinio. Poste la ŝipo daŭrigis kun li al Dunkerque kaj Le Havre, kie li trovis laboron ĉe riĉa franca familio kiel ĝardenisto. En septembro li reveturis al Marsejlo kaj de tie reen al Vjetnamio. Antaŭ ol forlasi Francion Nguyen Tat Thanh skribis peton al la ŝtatestro por esti akceptita en la Kolonia Lernejo kun la klarigo, ke li povus esti utila por Francio rilate al siaj samlandanoj. Kiam li alvenis en Vjetnamio, li vane serĉis sian patron, tiel ke li ŝipe reveturis al Marsejlo. Tie oni sciigis al li, ke lia peto al la prezidento estis rifuzita. La sekvan tempon li pasigis kiel dungito sur marŝipo kaj tiel konatiĝis kun Afriko kaj Azio. En 1914 liaj leteroj, kiuj evidente estis observataj, kaptis la atenton de la franca sekureca servo, sed dume sen sekvoj. La unuajn jarojn de la mondmilito Nguyen Tat Thanh verŝajne pasigis en Londono, sed li asertis, ke li vivis certan tempon en Usono. Nu ŝajnas, ke li ĉefe restadis en Parizo, kie li trovis

aliron al la granda vjetnama komunumo vivanta en la ekzilo. Tie li ekhavis kontakton kun Phan Chu Trinh kaj Phan Van Truong, du aktivuloj, kiuj estis serĉataj de la franca polico. Kun tiuj du samnaciaj Nguyen Tat Thanh fondis en 1919 la “Unuiĝon de patriotaj anamanoj”. En tiu ĉi organizaĵo Nguyen Tat Thanh ludis la motoran rolon. Nome de la unuiĝo Nguyen Tat Thanh lanĉis unuafoje sensacian politikan agon. Inspirita de la 14 punktoj de Woodrow Wilson pri la rajto de la popoloj je aŭtonomeco, en somero 1919 Nguyen Tat Thanh skribis peticion, kiu prezentis la postulojn de la anama popolo. La peticio estis transdonita al la partoprenantoj de la versajla packonferenco kaj al membroj de la franca parlamento. Por atingi plej vastan efikon, la peticio, kiu estis subskribita en la nomo de la “Grupo de vjetnamaj patriotoj”, estis publikigita ankaŭ en la franca socialista gazeto *L'Humanité*. La peticio enhavis inter alie jenajn postulojn: Amnestio por la politikaj malliberuloj, reformo de la justica sistemo en Hindiĉinio, garantiado de la libereco de la opinioj kaj gazetaro, elekto de vjetnama delegito en la francan parlamenton. La ekziĝo de Vjetnamio el la franca kolonia sistemo ne apartenis al la postuloj. Kopioj de la peticio eĉ cirkulis sur la stratoj de Hanojo. Kompreneble, la francoj estis konsternitaj kaj komencis esplori la faktojn pri tiu nekonata “Nguyễn Ái Quốc” (kio signifas: “Nguyen la patrioto”), kiu subskribis la peticion, pritaksitan de la francoj kiel kalumnio. La sekreta servo baldaŭ divenis, ke Nguyen Ai Quoc estas neniu alia ol Nguyen Tat Thanh. Ekde tiu momento, Nguyen Ai Quoc alias Nguyen Tat Thanh ne nur estis persekutita de la franca polico, sed fariĝis ankaŭ tre konata nomo en Vjetnamio. Kvankam la usonaj delegitoj promesis plusendi la peticion al Wilson, tamen la peticio malsukcesis. Kiam la packonferenco finiĝis, evidentiĝis, ke la grandpotencoj ne atribuis atenton al la postuloj de la vjetnama popolo. Sekve, inter la ekzil-vjetnamoj de la “Gobelina grupo” eksplodis akra disputo. Nguyen Ai Quoc riproĉis al siaj kolegoj, ke ili kondukas kiel obeemaj ŝafoj kaj fariĝis la komplikoj de la francoj. Aliaj opiniis, ke la vjetnamoj utiligu la francan koloniismon por modernigi la vjetnaman socion kaj liberigi sin de la konfucea spirito (laŭ kiu Nguyen Tat Thanh estis edukita). Dume, Nguyen Ai Quoc pasigis multe da tempo en parizaj bibliotekoj, kie li studis la socialisman literaturon. Inter alie li legis la “Tezojn pri la nacia kaj kolonia demando” de V.I. Lenin, kiuj evidente forte impresis kaj influis lian menson. Laŭ tiuj tezoj la komunismaj partioj de la Okcidento devis alianciĝi kun la naciismaj movadoj en Azio kaj Afriko kaj kune kontraŭbatali la okcidentan imperiismon. Tiel, Nguyen Ai Quoc politike moviĝis pli kaj pli maldekstren.

Rilatoj kun francaj komunistoj

Dum la jaro 1920 Nguyen Ai Quoc kutimis partopreni renkontiĝojn de la Franca Socialista Partio (SPF) kaj de la Ligo de Homaj Rajtoj. Baldaŭ li komprenis, ke la francaj socialistoj ne tro emas okupiĝi pri la franca koloniismo, kiun ili konsideris kvazaŭ margena problemo de la monda politiko. Nguyen Ai Quoc aliĝis al iu radikala grupo ene de SPF, kiu apogis la bolŝevisman revolucion en Ruslando. Kiam fine de 1921 Nguyen Ai Quoc elpaŝis en la Kongreso de SPF en Tours, akuzante la francajn koloniistojn, la polico klopodis kapti lin, sed la protestanta vjetnamo ĝuis la protekton de la kongresanoj. En Tours la delegitoj de SPF decidis aliĝi al la Tria Internacio. Tiel, Nguyen Ai Quoc fariĝis fonda membro de la Franca Komunista Partio (KPF). Sed ankaŭ la francaj komunistoj restis pasivaj rilate la vjetnaman demandon, tiel ke Nguyen Ai Quoc seniluziiĝis pri ili kaj venis al la konkludo, ke la marksismo verŝajne pli taŭgas por Azio ol por Eŭropo, ĉar en Azio ekzistas tradicioj de egala disdivido de la posedo, komuna kultivado de la tero ktp. Krom tio li konsideris, ke la komunismo estas tute bone harmoniigebla kun la konfuceismo. Kiam la kverelo kun la “Gobelina grupo” montriĝis senelira, Nguyen Ai Quoc forlasis ĝin kaj aliĝis al la “Interkolonia Unuiĝo”, kiu estis fondita en oktobro 1921. En ĝi precipe vjetnamoj kaj madagaskaranoj diskutis pri la politikaj kaj ekonomiaj problemoj en la kolonioj. En aprilo Nguyen Ai Quoc eldonis la gazeton *Le Paria*, kiu devis funkcii kiel organo de la popoloj koloniigitaj de Francio. Por solvi siajn financajn problemojn, Nguyen Ai Quoc plenumis porokazajn laborojn kaj skribis artikolojn por *L'Humanité*.

En junio 1923, kaj nerimarkite de la sekreta polico, Nguyen Ai Quoc subite malaperis el Parizo por reaperi kelkajn monatojn poste en Moskvo. Lia forveturo el Francio estis organizita konspire: En la Norda Stacidomo, Nguyen Ai Quoc, vestita kiel riĉa azia komercisto, eniris la trajnon por vojaĝi al Berlino. En Hamburgo li trafis ŝipon, per kiu, registrita kiel ĉina komercisto Chen Vang, li estis transportita al Petrogrado en Sovetunio, kie Nguyen Ai Quoc alvenis la 30an de junio 1923.

En Moskvo

Nguyen Ai Quoc estis invitita por partopreni en la unua Internacia Kamparana Konferenco kaj por la fondo de la kamparana internacio “Kresintern”. En la konferenco li finis sian paroladon per la averto, ke Komintern fariĝos vere internacia nur se al ĝi apartenos ankaŭ aziaj kamparanoj. Kun Lenin li ne plu persone konatiĝis; la gvidanto de la ruslanda revolucio estis grave malsana kaj forpasis en januaro 1924. Por doni la plej lastan honoron al li, Nguyen Ai Quoc almenaŭ ĉeestis la funebran kaj entombigan ceremonion en Moskvo. Verdire Nguyen Ai Quoc kredis, ke li restos en la sovetia ĉefurbo por ricevi la helpon de Komintern por reveturi tra Ĉinio al Vjetnamio. Sed dume pasis naŭ monatoj kaj nenio okazis, tiel ke en marto 1924 li finfine direktiĝis al Komintern por postuli, ke li estu oficiale sendita al Ĉinio kun la necesa monbudĝeto. Post kiam liaj leteroj al Grigorij Zinovev, la ĝenerala sekretario de Komintern, restis neresponditaj, li kontaktis la “Orientan Buroon” de Komintern. Nguyen Ai Quoc plendis pro la izoligo de la popoloj de la oriento kaj sugestis la fondon de “Unuiĝo de la aziaj komunistoj”. En majo 1924 Nguyen Ai Quoc ricevis legitimilon kiel “eksterordinara kunlaboranto” de Komintern. Lia tasko estis verki artikolojn kaj raportojn pri la situacio en Hindoĉinio. Sed li verkis ankaŭ libron kun la titolo ‘La Procezo de la franca koloniigo’, kiu estis publikigita en 1926 en Parizo. Dum la 5a Komintern-kongreso Nguyen Ai Quoc perdis la paciencon kaj akre riproĉis al la delegitoj ties pasivecon rilate la situacion en la kolonioj. Je lia ĉagreno en la fina rezolucio de la kongreso eĉ ne estis aldonita koncerna paragrafo pri la solvo de la kolonia demando.

La situacio en Sovetunio estis tro influita de la fatala kverelo inter Trockij unuflanke kaj Stalin, Kamenev, Zinovev aliflanke. Malgraŭ tio, Nguyen Ai Quoc kredis, ke li almenaŭ atingis, ke la kolonia demando eniris la konscion de la Komintern-funkciuloj. Nguyen Ai Quoc eble estis tro entuziasma kaj ankaŭ iom supertaksis sian statuson en Komintern. En la hotelo Luks, la oficiala gastejo de la organizaĵo, li ricevis nur modestan ĉambron. Entute li restis malkontenta pri sia restado en Moskvo. En oktobro 1924 li finfine povis veturi al Ĉinio. Post trisemajna trajnveturo tra Siberio li alvenis al Vladivostoko, kie per ŝipo li daŭrigis al Kantono, kiun li atingis en novembro.

En Ĉinio

Dume, en Azio okazis gravaj ŝanĝoj. En oktobro 1911 estis forigita la Qing-dinastio kaj Sun Yat-sen (1866/70-1925) estis proklamita kiel prezidanto de la nova ĉina registaro. Post interrompo, Sun Yat-sen revenis al la potenco en 1921. En januaro 1923 li ligiĝis kun la bolŝevisma registaro en Moskvo kaj la Komunisma Partio de Ĉinio, kiu estis fondita en majo 1921. Tiucele, Sovetunio sendis en aŭtuno 1923 grupon de fakuloj al Kantono, kiu devis konsili la ĉinan registaron kaj reorganizi la movadon Kuomintang de Sun Yat-sen laŭ la modelo de la bolŝevisma partio. Nguyen Ai Quoc alvenis en Ĉinio ĝuste kiam la politika situacio estis ege komplika. En junio 1924 vjetnamaj naciistoj atencis kontraŭ la ĝenerala guberniestro de Hindoĉinio, Martial Merlin, kiu troviĝis en Kantono. Tio estis la unua provo de aziaj revoluciuloj likvidi gravan reprezentanton de la koloniisma regado. Sed la atenco fiaskis kaj la guberniestro restis viva. La koloniisma gazetaro supozis, ke malantaŭ tiu atenco troviĝas Sovetunio. En Kantono Nguyen Ai Quoc aperis kun la nomo “Ly Thuy” kaj loĝis en la vilao de Miĥail Borodin, la estro de la surloka sovetia delegacio. Al liaj taskoj apartenis la verkado de artikoloj kaj raportoj pri la situacio de la kamparanoj en Ĉinio kaj, precipe, la konstruado de nova revolucia organizaĵo por meti la fundamenton de propra vjetnama komunisma partio. Ly Thuy komencis aranĝi klerigajn kursojn, sed al li mankis la financoj. La mono, kiun li ricevis de Komintern, ne longe suffiĉis.

Dum li konstruadis sian vjetnaman Kuomintangon kaj trovis novajn membrojn, la franca sekureca servo jam eltrovis la veran identecon de tiu mistera Ly Thuy, kiu en 1925 fondis la gazeton *Thanh Nien* (Junularo) kaj la organizaĵon “Ligo de la Subpremataj Popoloj”. Unu el la vjetnamaj kontraŭkoloniismaj aktivuloj, Phan Boi Chau, povis esti arestita de la francoj kaj resendita al Vjetnamio. Phan Boi Chau originis de la sama distrikto kiel la patro de Nguyen Tat Thanh kaj estis lia amiko. Krom tio, Nguyen Ai Quoc laboris kiel instruisto (de la marksismo-leninismo) kun la kaŝnomo “Vuong”. Li konatiĝis ankaŭ kun Zhou Enlai (1898-1976), la posta gvida funkciulo de Ĉinio.

Diference de Lenin, Nguyen Ai Quoc pli emfazis la signifon de la nacia sendependeco de la popoloj kaj atribuis al la kamparanoj pli da influo ĉe la revolucio. Pro tio Nguyen Ai Quoc poste rikoltis la riproĉon de siaj ideologiaj kontraŭuloj, ke li strebis disvastigi ian “kamparanan komunismon”. Laŭ Nguyen Ai Quoc, la ideala revoluciulo estis kuraĝa kaj disciplinita, preta submetiĝi sub la kolektivo kaj suferi kiel viktimo, krome li estis ŝparema, prudenta, modesta kaj preta kritiki sin mem, sed li estis ankaŭ diligenta kaj lernema kaj grandanima en la rilato kun aliaj – ĉiuj ĉi moraltrajtoj estis tipe konfuceaj. Ankaŭ liaj disĉiploj, kiuj devenis de burĝaj klerulaj familioj, estis influitaj de la konfucea spirito, kvankam ili jam emancipiĝis de malnovaj moraltradicioj. La konfuceismo batis ankaŭ en la koro de la posta Ho Ci Minh (kiel la cionismo kaj homaranismo batis en la koro de Zamenhof, kvankam en la Esperanto-movado li ne parolis pri tio).

Malgraŭ lia multflanka agado kiel partia aktivulo, ĵurnalisto, tradukisto kaj instruisto la 36-jara Nguyen Ai Quoc emis fondi familion. Tiucele, li konatiĝis kun la 21-jara ĉinino Tang Tuyet Minh, filino de riĉa kantona komercisto. Sed la malfavoraj cirkonstancoj kaŭzis, ke la geedza rilato, kiu estis malrekomendita de diversaj flankoj, ne daŭris tro longe.

Post la morto de Sun Yat-sen en marto 1925 la tensioj inter lia posteulo Chiang Kai-ŝek (1887- 1975) kaj la komunistoj akriĝis. En aprilo 1927 soldatoj de Kuomintang masakris laŭ la ordono de Chiang Kai-ŝek milojn da komunistoj. La alianco estis nuligita kaj la komunista partio devis malaperi en la subteron. La persekutado de komunistoj estis daŭrigita en la provinco Guandong. Nguyen Ai Quoc ĝustatempe eskapis – kaj sian ĉinan edzinon li neniam plu revidis. El Ŝanhajo Nguyen Ai Quoc veturis reen al Vladivostoko kaj alvenis en Moskvo en junio 1927. La bilanco de lia kantona restado havis du flankojn: Unuflanke, laŭ propra pritakso, 75 personoj trapasis lian propagandan lernejon, tiel ke oni povis paroli pri sukcese starigita fundamento de la onta komunisma partio en Hindiĉinio. Aliflanke, post la kruela sufokado de la komunisma movado fare de Kuomintang, plua agado en suda Ĉinio ne plu estis ebla.

Vojaĝo al Siamo

En Moskvo Nguyen Ai Quoc esprimis la deziron iri al Siamo por povi agi pli proksime de Vjetnamio. Sed Komintern havis aliajn planojn. Post sia kuracado de la tuberkolozo en Krimeo en somero 1927 ĝi sendis lin al Parizo kun la tasko helpi al la franca KP starigi revolucionan agadprogramon por Hindiĉinio. Sed tio estis vana ideo, ĉar la franca KP estis kvazaŭ paralizita kaj ankaŭ ne povis finance helpi al Nguyen Ai Quoc. Krom tio, la vjetnama revoluciulo estis en danĝero pro la observado flanke de la sekureca polico. En decembro 1927 Nguyen Ai Quoc veturis al Bruselo por ĉeesti kunvenon de la Kontraŭ-imperiisma Ligo. Poste Nguyen Ai Quoc restadis en Berlino, kie li atendis instrukcion kaj monon el Moskvo. Sed li vane atendis. Por pasigi la tempon, li verkis raporton pri la situacio de la revolucia movado en Ĉinio. Baldaŭ li sendis leteron al Komintern, al kiu li esprimis sian frustracion pro nenionfarado. Finfine, Komintern respondis kaj li ricevis, krom iom da mono, la verdan lumon por iri al Siamo. Tiel, fine de majo 1928 Nguyen Ai Quoc forlasis Berlinon kaj veturis tra Svislando al Napolo, kie en junio li enŝipiĝis por esti transportita al Siamo. Intertempe, en Moskvo okazis la 6a kongreso de Komintern, dum kiu la strategia kurso estis draste ŝanĝita. Sub la impreso de la masakro de Ŝanhajo kaj la lukto inter Stalin kaj Trockij, la kongreso decidis rezigni pri la strategio de la unueca fronto, kiu ĝis nun validis kaj kiun Nguyen Ai Quoc reprezentis. Tio signifis, ke la komunistoj estis alvokitaj rezigni pri sia kunlaboro kun la burĝaj naciistoj kaj pli multe koncentriĝi pri la kontraŭ-kapitalisma klasbatalo, ĉar atendata estis la baldaŭa disfalo de la monda kapitalismo. Kiam Nguyen Ai Quoc alvenis en Bangkoko en julio, li nenion sciis pri tiu nova drasta maldekstriĝo de Komintern, kaj por li daŭre validis la linio de la unueca fronto. Detaloj pri la restado de Nguyen Ai Quoc en Siamo apenaŭ estas konataj. La franca sekureca polico perdis la spurojn. En oktobro 1929 en Nghe An Nguyen Ai Quoc foreste estis kondamnita al la morto. Do, li ne povis transiri la limon al Vjetnamio. En Siamo, kiu ne estis kolonio, sed memstara monarkio (ekde 1932 respubliko, ekde 1939 nomita Tajlando), Nguyen Ai Quoc povis almenaŭ sufiĉe libere moviĝi kaj devis kaŝi sin, vagante kiel asketa saĝulo de vilaĝo al vilaĝo, konstante ŝanĝante sian nomon por resti nekonata. En septembro li alvenis en Udon, kiu estis unu el la centroj de la ekzil-vjetnamoj en Siamo. En Udon Nguyen Ai Quoc renkontis kelkajn disĉiplojn de la lernejo en Kantono. Probable en junio 1929 li reiris al Bangkoko. Intertempe ŝvelis la konflikto inter la diversaj frakcioj ene de la vjetnama naciliberiga movado. Iuj, kiuj ne konsentis kun la aliaj, fondis novan

komunistan partion kaj akuzis aliajn kiel falsajn revoluciulojn aŭ etburĝajn oportunistojn. Kun tio aperis ankaŭ diversaj konkurenculoj de Nguyen Ai Quoc. Kiam la kaoso kaj la skismo estis perfektaj, oni serĉis Nguyen Ai Quoc kiel peranton. Kiam Nguyen Ai Quoc ricevis la vokon, li veturis al Kantono, kie li renkontis siajn kolegojn. Dum la reuniga konferenco, kiu okazis en februaro 1930 en Honkongo, Nguyen Ai Quoc pretendis sian influon kiel reprezentanto de Komintern. Laŭ propraj klarigoj, Nguyen Ai Quoc sukcesis interpacigi la rivalemajn komunistojn kaj konvinki ilin fondi la unuecan Komunisman Partion de Vjetnamio (Đảng Cộng sản Việt Nam). Laŭ la oficiala vjetnama partia historiografio tio okazis la 3an de februaro 1930. La programo de la nova partio portis la karakteron de la strategia sinteno de Nguyen Ai Quoc kaj kontrastis kun la linio de Komintern kaj kun ties instrukcioj pri la fondo de vjetnama komunisma partio de la fino de 1929. Post tio Nguyen Ai Quoc reveturis al Ŝanhajo por daŭrigi sian laboron kiel estro de la Malproksimorienta Buroo de Komintern. En marto 1930 li restadis denove en Siamo por konkretigi la planon pri la fondo de la Komunisma Partio de Siamo kaj starigi kontaktojn kun komunistoj en Laoso kaj centra Vjetnamio. La fondo de la siama partio okazis en aprilo 1930. En la sama monato Nguyen Ai Quoc iniciatis en Singapuro la malfondon de la sudĉina komunisto partio kaj la novfondon de la komunisto partio de Malajo. Tiel, la vjetnama aktivulo klopodis krei komunismajn partiojn en tuta sudorienta Azio. Post kiam en Vjetnamio estis disbatita la ribelo de la naciisma partio, ĉi tiu partio ne plu ludis daŭran rolon. En septembro 1930 eksplodis nova ribelo en la provinco Nghe An, la patrujo de Nguyen Ai Quoc, kaj estis starigitaj konsilioj (“sovetoj”).

Sed Nguyen Ai Quoc dubis, ĉu en Vjetnamio ekzistas la kondiĉoj por efektivi sukcesan ribelon. Observante la evoluon, Komintern nepre puŝis sian volon. Ĝi malfondigis la Komunisman Partion de Vjetnamio, starigis la Komunisman Partion de Hindoĉinio (KPI) kaj trudis al ĝi sian politikon, kiu ekskludis la unuecan fronton. Tio signifis, ke Nguyen Ai Quoc praktike perdis la fidon de Komintern kaj sian influon en tiu nova partio. Komintern distanciĝis de Nguyen Ai Quoc, kiu devis kritiki sin mem kaj konfesi siajn ‘erarojn’, se li volis havi iun ŝancon por pluekzisti en la komunisma movado. Ĝenerala sekretario de la nova KPI fariĝis iu Tran Phu (1904-31), kiu ne ŝatis Nguyen Ai Quoc kaj celis forpuŝi lin, konsiderante lin ano de la malnova generacio. En marto 1931 la partio decidis purigi sin de ĉiuspecaj intelektuloj kaj “konservemaj elementoj”, kiuj devis esti anstataŭitaj de laboristoj kaj malriĉaj kamparanoj. Tiu ideologia ekstremismo kondukis en centra Vjetnamio al perfortaj ekscesoj kontraŭ malnovaj partiaj membroj, kiuj el la vidpunkto de la novaj regantoj ne disponis pri la sufiĉa proleta klaskonscio, kvankam ili estis patriotoj. En printempo 1931 la francoj kruele likvidis la novan sovetan movadon en Vjetnamio kaj mortigis eble 2’000 aktivulojn kaj arestis pli ol 50’000 personojn. Samtempe, ili lanĉis detruan baton kontraŭ KPI, arestis Tran Phu, kiu mortis kelkajn monatojn poste en franca malliberejo.

Aventuro en Honkongo

Ĉiuj partiaj strukturoj estis disbatitaj, do, novaj gvidantoj estis bezonataj. Sed Nguyen Ai Quoc ne povis esti konsiderata, ĉar li reprezentis la unuecan fronton. Do, li devis atendi plurajn jarojn por denove povi ludi iun gravan rolon en la movado. Nguyen Ai Quoc estis arestita en junio 1931 en Honkongo. En la rilatoj kun la polico li ludis ruzan duoblan ludon. Unuflanke li identigis sin kiel ĉinon kun la nomo “Sung Man Cho”, aliflanke li konfesis sin nekomunisto kaj rakontis, ke li estas vjetnama patrioto, kiu estis mortkondamnita en sia patrujo (kio estis vera). Honkongo apartenis al la britoj, kiuj ne havis juran rajton simple transdoni la arestitan vjetnamon al la francaj koloniaj aŭtoritatoj. Sed “Sung Man Cho” bonŝancis. Anstataŭ esti sendita al Ŝanhajo, kie lin povintus kapti la francoj, Nguyen Ai Quoc ricevis juran protekton de iu grupo de advokatoj, kiuj postulis, ke li rajtu forlasi Honkongon kun celo elektita de li mem. La aresto de Nguyen Ai Quoc kaŭzis eĉ internacian atenton, kaj Komintern intervenis je lia favoro. La britoj decidis, ke Nguyen Ai Quoc, „unu el la plej teruraj aktivuloj”, estu senprokraste liverita al la francoj en Hindoĉinio. La ordono estis konfirmita de la Supera Tribunalo en Londono. Sed lia honkonga advokato protestis kaj la kazo prokrastiĝis je pliaj monatoj. Por kuraci la tuberkulozon, Nguyen Ai Quoc dume devis esti sendita al malsanulejo. En iuj gazetoj oni eĉ diskonigis lian morton. Finfine la angloj permesis al li forlasi Honkongon, kaj fine de 1932 li estis liberigita. Sed kiam li volis atingi Singapuron, la tieaj aŭtoritatoj rifuzis al li la eniron kaj resendis lin al Honkongo. Finfine la angloj transportis lin kaŝe al Xiamen en suda Ĉinio, de kie li pluveturis al Ŝanhajo, kie li plu ludis sian rolon

kiel riĉa komercisto, loĝante en luksa hotelo. Post tiuj aventuroj iuj ĉinaj kamaradoj organizis lian pluveturon al Sovetunio, kaj en julio 1934 li troviĝis en Moskvo, kie li kredis sin sekura.

Tedaj jaroj en Sovetunio

Sed en Moskvo Nguyen Ai Quoc ne estis tre bonvena kaj renkontis malamikan klimaton kun forta vento direktita kontraŭ li mem. La etoso en la urbo multe ŝanĝiĝis kaj estis karakterizita de la stalinisma kulto, partiaj purigoj kaj amasaj likvidoj de nedezirataj homoj. Ankaŭ Nguyen Ai Quoc timis, ke li mem povus fariĝi viktimo de la ‘Granda Teroro’, ĉar por tio ekzistis pluraj kialoj. Ne nur lia starpunkto pri la unueca fronto ne plu kongruis kun la aktuala politiko de Komintern, sed en tiu organizaĵo mem troviĝis homoj, kiuj malfavoris lian personon. Ŝajnas, ke Nguyen Ai Quoc bone komprenis la danĝerojn, do, necesis esti tre singarda kaj prudenta. Komintern ne donis al li konvenan postenon, sed sendis lin al iu lernejo, por ke li pliklerigu pri partiaj temoj. Krom tio, iuj novaj oportunismaj gvidantoj de la Komunista Partio de Hindoĉinio mem, precipe Ha Huy Tap kaj Le Hong Phong, kritikis la “naciisman heredaĵon” kaj la “reformismon kaj idealismon” de Nguyen Ai Quoc. Dum la partia konferenco en Makao en marto 1935 la statuso de Nguyen Ai Quoc estis eĉ pli malaltigita; li fariĝis nur kandidato de la CK, dum Ha Huy Tap (1906-41) fariĝis ĝenerala sekretario. Precipe la ĉi-lastata funkciulo montriĝis sufiĉe agresema kontraŭ Nguyen Ai Quoc, al kiu li riproĉis diversajn erarojn, kiujn tiu laŭ li faris en la pasinteco. La prezidanto de la siama KP dubis, ke Nguyen Ai Quoc estis komunisto antaŭ 1930, kaj la ĉina reprezentanto en iu komisiono de la CK de KPSU, kiu devis esplori la kazon de Nguyen Ai Quoc, eĉ postulis la eliminon de Nguyen Ai Quoc. Sed Nguyen Ai Quoc defendis sin laŭ sia maniero. En januaro 1935 li plendis en letero al Komintern, ke ĉiuj tiuj novaj pli junaj gvidantoj de KPI estas senspertuloj kaj pretaj fari erarojn. Antaŭ ol transdoni al ili gvidajn funkciojn oni prefere instruadu kaj pliklerigu ilin. Sed lia plendo restis senefika kaj Nguyen Ai Quoc restis iusence malhonorita persono. Sed iom poste, la bonŝanco revenis por Nguyen Ai Quoc:

Dum sia 7a kongreso Komintern en julio 1935 denove modifis la ĝisnunan strategion kaj donis nun la preferon al la t.n. popola fronto kun la celo kunigi ĉiujn progresemajn kaj demokratiajn fortojn en komuna alianco kontraŭ la danĝeroj de la faŝismo. Dum la delegitoj reveturis en siajn landojn, Nguyen Ai Quoc, restis en Moskvo. Ŝajnas, ke ĝis nun en Sovetunio oni konsideris, ke la situacio en Vjetnamio ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por lanĉi la sukcesan naciliberigan batalon. Interese estas la fakto, ke li ne estis tuŝita de la reprezalioj, kio estas ioma miraklo. Probable li ĝuis la fidon de Dmitrij Manuilskij, iu altrangulo en Komintern. Sed li devis atendi ankoraŭ tri jarojn por reaktiviĝi en la batalo kontraŭ la franca okupado. Li vizitis la Stalin-lernejon, kie li frekventis kursojn pri dialektita materiismo, historio kaj rusa lingvo. Krom tio, li tradukis la Komunisman Manifeston al la vjetnama lingvo. Kiam en junio 1938 Nguyen Ai Quoc entreprenis novan provon por povi foriri al Vjetnamio, la “Lernejo por Naciaj kaj Koloniismaj Demandoj” konformis al lia deziro. Antaŭ lia forvojaĝo Nguyen Ai Quoc ankoraŭ estis akceptita kaj persone adiaŭita de Georgi Dimitrov, la bulgara ĝenerala sekretario de Komintern.

Reveno al Vjetnamio

En Vjetnamio Hu Huy Tap rigide kontraŭstaris la novan popolfroktan strategion de Komintern. Sed baldaŭ la rezisto formiĝis kontraŭ Hu Huy Tap mem, kiu en marto 1938 estis anstataŭita de Nguyen Van Cu kiel nova ĉefo de KPI. Sed en aprilo 1938 en Parizo la popolfrota registaro fiaskis, kaj fine de septembro 1939 la ĝenerala guberniestro en Vjetnamio malpermesis la Komunistan Partion de Hindoĉinio inkluzive de ĉiuj ĝiaj publikaĵoj. Miloj da komunistaj membroj estis arestitaj, ankaŭ Nguyen Van Cu, dum aliaj fuĝis aŭ ĉesigis sian aktivecon. En novembro 1940 kiel nova ĝenerala sekretario de KPI estis elektita “Trương Chinh” alias Đặng Xuân Khu (1907-88). Dum la dua mondmilito la japanoj okupis Vjetnamion, kaj la francoj profitis la okazon arestigi kaj likvidi milojn da vjetnamaj komunistoj, inter alie Ha Huy Tap, Nguyen Van Cu kaj Nguyen Thi Minh (1910-41), la laŭdiran eksedzinon de Nguyen Ai Quoc alias “Lin”, kiu poste edziĝis al Le Hong Phong. La gvidantaro de la komunista partio de Hindoĉinio do estis preskaŭ komplete elsarkita. Nguyen Ai Quoc, la plej lasta edukito de Komintern, klopodis restarigi la kontaktojn kaj partiajn ĉelojn en suda Ĉinio. Sed tio estis danĝera afero, ĉar la regiono estis kontrolata de Kuomintang. Do, li devis aktivi jen sub la kaŝnomo “Hu Guang”, jen vestita

kiel budhana monaĥo. Fine de 1940 li atingis la ĉinan-vjetnaman limon kaj ekorganizis politikajn trejnkursojn por elektitaj naciistoj. La novaj gvidantoj de KPI agnoskis la superecon de Nguyen Ai Quoc, kvankam li mem ne pretendis fariĝi ĉefo de la partio. Vestita kiel ano de la Nung-nacimalplimulto, en februaro 1940 Nguyen Ai Quoc atingis kun sia grupo la vjetnamian teritorion. Post tridek jaroj da foresto li do finfine denove estis en sia patrujo. Tie, en la provinco Cao Bằng, li kunordigis la gerilan agadon kaj fondis la novan “Ligon por la Sendependeco de Vjetnamio”, nomita “Việt Minh”. La celo estis kontraŭbatali kaj la francojn kaj la japanojn, en eventuala kunlaboro kun la usonanoj. Inter 1941 kaj 1947 kontaktoj kun Moskvo ne ekzistis. En aŭgusto 1942 li reiris al Ĉinio por kontakti Kuomintang kaj la komunistojn. Lia pasporto surhavis nun la nomon “Hồ Chí Minh” (kio signifas: “Ho kun forta volo kaj inteligenteco”), sed ĝi ne plu estis valida. Policistoj de Kuomintang, de kiuj li estis kontrolita, supozis, ke temas pri franca aŭ japana spiono kaj arestis lin. Dum unu jaro Ho Chi Minh estis transportita de prizono al prizono. Pri tiu tempo li verkis bravajn poemojn en la ĉina lingvo, kiuj poste trovis en formo de “Prizona taglibro” multajn legantojn. La novaĵo pri lia aresto atingis liajn samideanojn, tiel ke eĉ Zhou Enlai, la gvidanto de la KPI-oficejo en Chonqing, klopodis liberigi lin. La usonanoj fariĝis atentaj pri Ho Chi Minh fine de 1942, kiam ĉinaj gazetoj raportis pri lia aresto. En septembro 1943 li povis forlasi la prizonon, sed dume ne rajtis forlasi sian loĝejon. En aŭgusto 1944 Ho Chi Minh finfine povis reiri al Vjetnamio.

La vojo al la sendependiĝo

Liaj kunbatalantoj kredis Ho Chi Minh morta. Dume, la francaj koloniistoj kruele disbatis la trupojn de Viet Minh kaj detruis la vilaĝojn de ĝiaj aktivuloj. Kiam en marto 1945 la franc-japana alianco disfalis, Ho Chi Minh alvokis la vjetnamojn liberigi sin de la kolonia jugo. La 9an de marto la japanoj proklamis la francan regadon nuligita, kiu daŭris entute ok jardekojn. En la sekvo la usonanoj subtenis la movadon Viet Minh per armiloj. Sed ankaŭ post la japana kapitulaco la 15a de aŭgusto 1945 la vera identeco de Ho Chi Minh estis daŭre kaŝita kaj lia komunisma pasinteco prisilentita. Fakte nur malmultaj gvidantoj konsciis, ke temis pri Nguyen Ai Quoc. Dum iu kongreso de Viet Minh Ho Chi Minh estis elektita kiel gvidanto de iu Nacia Liberiga Komitato, kiu estis la prototipo de nova vjetnama registaro. Meze de aŭgusto 1945 Viet Minh transprenis la povon en la lando. Ĉi tiu evento eterniĝis kaj mitiĝis en la oficiala vjetnama historiografio kiel “aŭgusta revolucio”. La 26an de aŭgusto Ho Chi Minh alvenis en Hanojo – unuafoje en sia vivo li vidis tiun ĉi urbon. Samtempe estis proklamita la unua provizora registaro de Vjetnamio kun Ho Chi Minh kiel ĝia prezidanto kaj kun aro da nekomunismaj ministroj. La malnova imperiestro Bảo Đại (1913-97) abdikis en Hue. La oficiala ceremonio okaze de la proklamo de la vjetnama sendependeco okazis la 2an de septembro. En sia parolado Ho Chi Minh, portante kakikoloran uniformon kaj nigrajn plastikajn sandalojn, disaŭdigis la frazon “Ĉiuj homoj estas kreitaj egale”, tio estis citaĵo el la usona sendependec-deklaro de 1776. Krom tio li uzis frazojn el la deklaro pri homaj kaj civitanaj rajtoj el la franca (!) konstitucio de 1791. Sed poste Ho Chi Minh kontrastigis la francajn idealojn kun la malpli ĝojiga realeco de la franca regado en Hindoĉinio. Sekve, li nuligis ĉiujn kontraktojn kun la francoj, deklaris ĉiujn iliajn rajtojn kaj privilegiojn malvalidaj kaj proklamis la Vjetnaman Demokratian Respublikon. Kiel unua vjetnama prezidento Ho Chi Minh fariĝis samtempe la simbolo de la vjetnama revolucio. Ho Chi Minh alvokis la eksterlandajn potencojn respekti la sendependecon de la vjetnama popolo, kiun oni pretas defendi en kazo de neceso.

Daŭra lukto por la sendependeco

Kiel atendeble, la francoj reagis negative al la proklamo de la vjetnama sendependiĝo. Iu pariza oficisto mokis pri ĝi nomante ĝin miksaĵo de ŝovinisma patriotismo kaj intelekta marksismo. Kun la helpo de la britoj la francoj klopodis restarigi sian regadon en Vjetnamio kaj en oktobro 1945 komencis rekonkeri la teritorion sude de la 16a latitudo. Post la foriro de la britoj, en marto 1946 Francio denove kontrolis vastajn partojn de Koĉinĉinio. En Tonkino (norda Vjetnamio) alvenis Kuomintang-trupoj, kiuj estis apogataj de vjetnamaj nekomunismaj fortoj. De ili Ho Chi Minh estis prezentita kiel komunisto, kiu celas vendi la landon al la francoj. Al la draste kreskanta premo kontraŭ Viet Minh Ho Chi Minh reagis per unika taktiko: En novembro 1946 li proklamis la formalan memdissolvon de KPI kun la celo trankviligi Kuomintangon kaj por gajni la subtenon de la burĝaro,

de la grandbienistoj kaj katolikoj. Por stabiligi sian politikan potencon, la registaro de Ho Chi Minh bagateligis la rolon de la komunismo kaj anstataŭ la socialismo enkondukis moderajn reformojn en la administrado por helpi la evoluon de la kamparanoj. Krom tio, Ho Chi Minh klopodis alfabetigi la kamparanan amason kaj integri la naciismajn partiojn en la registaran laboron. La tragika kromsekvo de tiuj rimedoj estis, ke Viet Minh murdis milojn da politikaj kontraŭuloj. Ĝis hodiaŭ oni ne scias, kiu ordonis tiujn krimojn (la partiaj arkivoj en Vjetnamio daŭre ne estas konsulteblaj far eksterlandaj esploristoj). Diplomatie, la juna respubliko estis grandparte izolita. US-prezidento Truman certigis la francan ŝtatestron de Gaulle, ke Usono ne malhelpos la restarigon de la franca potenco en Vjetnamio. Por gajni la fidon de la usonanoj, Ho Chi Minh klopodis kredigi al ili, ke li ne estas komunisto aŭ marioneto de Moskvo. Li skribis al Stalin por atingi, ke la vjetnama demando estu traktita en Unuiĝintaj Nacioj. Sed respondo li ne ricevis. Ŝajnas, ke Vjetnamio ne multe interesis Sovetunio, kiun ĝi dume konsideris marĝena problemo. Anstataŭ riski novan sangan konflikton, Ho Chi Minh preferis trovi la solvon de la vjetnama demando kun la francoj en diplomaciaj intertraktoj. En 1946 li veturis al Parizo, kie li partoprenis en iu packonferenco kaj kie li varbis por sia politiko. En kompromiso al la francoj estis ceditaj iuj daŭraj interesoj en Vjetnamio, kaj Ho Chi Minh revenis el Francio sen esti atinginta kontentigajn rezultojn. Dum Ho Chi Minh, kies vera identeco kiel Nguyen Ai Quoc daŭre ne estis konata al la publiko, krom al liaj gefratoj, kiujn li renkontis en Hanojo, strebis atingi pacan solvon, liaj pli radikalaj kunbatalantoj abomenis kompromisojn kun la francoj kaj klopodis milite kontraŭbatali ilin kaj la politikajn kontraŭulojn. Nova milito kontraŭ Francio do ne estis evitebla kaj eksplodis en decembro 1946 en Hanojo, dum Ho Chi Minh mem malsaniĝis kaj devis kuŝi en la lito. Anstataŭ rezigni pri milito, la francoj akcelis ĝin kaj denove mortigis multajn anojn de Viet Minh. Samtempe ili proklamis marionetan vjetnaman ŝtaton kun Bao Dai kiel prezidanto. Pro la komenciĝanta Malvarma Milito la usonanoj tendencis apogi ĉiujn fortojn, kiuj batalis kontraŭ la komunistoj. Do, Ho Chi Minh, kiu estis suspektata kiel kriptokomunisto, dekomence ne povis multon atendi de Usono. En la rilatoj kun Sovetunio Ho Chi Minh devis esti singarda, ke li ne estis politike trompita aŭ konsiderita kiel reviziisto kaj traktita de Stalin same kiel la “neŭtralista” Tito en Jugoslavio. Do, la Vjetnama Demokrata Respubliko restis sufiĉe izolita kaj fragila.

Vjetnamio dividiĝas

Kiam la armeo de Mao Zedong okupis grandan parton de Ĉinio kaj la 1an de oktobro 1949 proklamis la Ĉinan Popolan Respublikon, Ho Chi Minh gratulis lin kaj veturis al Pekino. De tie li daŭrigis sian vojaĝon al Moskvo por peti la subtenon de Stalin. Sed tiu ĉi malvarme akceptis la vjetnaman kamaradon, ĉar li daŭre malfidis lin ĉu li estas vera komunisto aŭ ĉu li eble estas tamen kapitalisto. Ĉar Sovetunio celis koncentri sian atenton al Eŭropo, Stalin sugestis, ke Ĉinio okupiĝu pri Azio. Do, el Sovetunio Ho Chi Minh reveturis al Vjetnamio kvazaŭ kun malplenaj manoj. Tamen, Pekino kaj Moskvo almenaŭ starigis diplomaciajn rilatojn kun la registaro de Ho Chi Minh. Por ricevi la subtenon de Stalin oni devis nepre flati kaj glori lin. Do, Ho Chi Minh mem fariĝis stalinisto por certigi la agnoskon de sia komunisma partio fare de la moskva gvidanto. Ĉinio liveris armilojn al Viet Minh. Kiel respondo al tiuj faroj Usono diplomatie agnoskis la registaron de Bao Dai. Vjetnamio, kiu klopodis emancipiĝi kiel franca kolonio, tiel englitis la komenciĝantan Malvarman Militon. En 1952 Usono transprenis unu trionon de la francaj militelspezoj. Sub la komando de generalo Vo Nguyen Giap (*1911) Viet Minh klopodis lanĉi la decidan baton kontraŭ la francoj, sed ili ne sukcesis. Sekve, Viet Minh daŭrigis sian taktikon de la gerila milito. Iom post iom en Francio sentiĝis la milita laciĝo, sed en Vjetnamio en 1953 la nova franca ĉefkomandanto Navarre tamen decidis lanĉi novan batalon kontraŭ Viet Minh. Sed ĉi-foje la francoj miskalkulis ka aferojn. Kun la helpo de ĉinaj armiloj la armeo de Viet Minh kolektiĝis en la valo ĉe Điện Biên Phủ, kie ĝi decide venkis la francojn, kiuj komprenis, ke ilia okupa regado definitive pasis. En la ĝeneva packonferenco, kiu okazis de majo ĝis julio 1954, Viet Minh ricevis nur parte la konfirmon de sia venko, ĉar la teritorion sude de la 17a latitudo ili devis cedi al Bao Dai. Ho Chi Minh komprenis, ke la prezo por la paco kaj de la libereco estis la divido de la vjetnama lando, sed li kredis, ke la divido estas nur provizora kaj esperis, ke Vjetnamio baldaŭ reunuiĝos.

Kampara reformo per teroro

La franca armeo finfine malaperis el Hanojo komence de oktobro 1954, kaj Ho Chi Minh revenis el sia kaŝejo al la ĉefurbo kelkajn tagojn poste. Sed li rifuzis vivi en la palaco de la pli frua franca ĝenerala guberniestro kaj preferis loĝi en modesta ĝardeneta dometo apud la palaco. Nun sekvis malfacila periodo, en kiu la komunisma partio arogis al si klasifiki la kamparanan popolon en senteraj, malriĉaj kaj riĉaj kamparanoj kaj feŭdaj bienfarmistoj. Kontraŭ ĉi-lastaj precipe direktis sin la ekscesa interpretado de la koncerna reformleĝo de decembro 1953. La klasifikado estis farita kun multaj eraroj, kio signifis, ke sennombraj homoj estis false akuzitaj kaj mortigitaj, koncernitaj estis ĝis 15'000 personoj. La influoj kaj spuroj de la stalinismo kaj maoismo en tiu ĉi reformo estis klare sentebaj. La praktika rolo de Ho Chi Minh mem ĉe tiu reformo, kiu portas lian subskribon, ne estas klara. Unuflanke li ĉiam pledis por la paco kaj landa unueco kaj kontraŭ perforto kaj torturo, aliflanke li pravigis la kamparanan reformon en si mem kaj ĝian manieron de la efektiviĝo. En aŭgusto 1956 en la partia gazeto *Nhân Dân* Ho Chi Minh plendis pri la troigitaj mezuroj kadre de la kamparana reformo kaj konfesis erarojn. Post tiu interveno la partio ĉesigis la reformon kaj la purigojn en la partio, kiuj antaŭnelonge ankoraŭ estis pozitive pritaksitaj de Ho Chi Minh mem, kaj pardonpetis antaŭ la popolo. La ĉefaj partiaj respondeculoj, inkluzive de la ĝenerala sekretario Truong Chinh (1907-88), perdis siajn postenojn. En multaj vilaĝoj okazis reklasifikado de la kamparanoj, kaj fine de 1957 la ordo estis restarigita. Kvankam Ho Chi Minh evidente ne partoprenis en la praktika realigo de la kamparana reformo, unu fojon pli li saviĝis el tre tikla situacio kaj mem eskapis la partian purigon. Sed intertempe li fariĝis netuŝebla figuro, speco de partia ikono. Granda parto de la vjetnamaj intelektuloj apogis tiun purigon kaj mem pretis submeti sin al la kritiko kaj kontrolo de la partio, kiu aplikis rigidan kulturpolitikon. Sekve al la akcelita klasbatalo kontraŭ intelektuloj, ĉirkaŭ 800'000 vjetnamoj, inter ili ĉirkaŭ 650'000 katolikoj, fuĝis el la nordo en la sudan parton de Vjetnamio. Kadre de la malstalinigo sub Nikita Ĥruŝĉov (1894-1971) en Sovetunio en 1956, estiĝis en Vjetnamio inter intelektuloj, profesoroj kaj studentoj la liberisma Nhan-Van-Giai-Pham-movado, funkcia laŭ la modelo de la 'Cent-floroj-movado' en Ĉinio. Sed post la moskva konferenco en novembro 1957, kiu okupiĝis pri la "reviziismo" kaj trovis kun Ĉinio komunan reguligon por kontraŭbatali ĝin, ankaŭ en Vjetnamio estis lanĉita la reeduka kampanjo. En printempo 1958 verkistoj, artistoj kaj aliaj intelektuloj devis partopreni edukajn kursojn kaj estis senditaj al la kamparo por konatiĝi kun la realeco de la vivo, por ideologie plikleriĝi kaj discipliniĝi. Multaj sciencistoj perdis sian postenon en la universitatoj kaj artistoj ricevis laboran malpermeson. En 1960 la kulmino de tiu kampanjo estis atingita per farsa proceso, en kiu kvin partiaj membroj estis kondamnitaj kaj punitaj per multjara restado en prizono. Unu el ili estis liberigita nur en 1993. Ankaŭ en tiu ĉi kampanjo la rolo de Ho Chi Minh restas malklara. En liaj verkaĵoj, kiuj estas konataj, troviĝas neniu pria artikolo. Ho Chi Minh konsideris, ke la mortigado de homoj estas malmorala ideo, sed samtempe li restis tro pasiva por eviti tiujn procesojn kaj punadojn, despli ke li apogis la kampanjojn por elsarki la "burĝan individuismon" el la partio. En 1956 li komencis prediki la "demokratian centrismon", la konatan leninisman principon pri gvidado de la komunismaj partioj kaj organizado de socialismaj ŝtatoj. Sed estas ankaŭ tute evidente, ke Ho Chi Minh apogis la disbaton de la Nhan-Van-Giai-Pham-movado en Vjetnamio. En tiu procezo certe sennombraj homoj estis denove subpremitaj kaj persekutitaj, perdis siajn postenojn, oficojn kaj funkciojn, estis arestitaj kaj malliberigitaj aŭ mortigitaj. La 'Nigra Libro de la komunismo' (1997) estimis, ke en la tempo de la regado de Ho Chi Minh kaj la komunisma partio en Vjetnamio ĉirkaŭ unu miliono da homoj perdis sian vivon. Ŝajnas, ke la kolektivigo de la agrikulturo estis realigita post 1958 en Vjetnamio tamen sen la perfortaj ekscesoj, kiuj ankoraŭ karakterizis la kamparanan reformon.

Le Duan - nova konkurenco por Ho Chi Minh

Kvankam Ho Chi Minh eliris fortigita el tiu krizo, li baldaŭ denove perdis sian influon en la partio, kiam tuta sinistra bando da reakciuloj akaparis la povon en Hanojo. Post la demisio de Truong Chinh Ho Chi Minh ja mem transprenis komisie la oficon de la ĝenerala sekretario de la partio, sed koncentriĝis precipe je la ekstera politiko. Kiel diplomato li vojaĝis al Ĉinio kaj Sovetunio kaj vizitis unufoje la socialismajn landojn en orienta Eŭropo, inkluzive de GDR. La nova forta figuro en Vjetnamio dume fariĝis Lê Duân (1907-86), la estro de la partia komitato en Sudvjetnamio. Komence de 1957 li estis akceptita kiel plenrajta membro de la politburoo. Le Duan pledis por perforta reaktiviĝo kaj milita solvo de la vjetnama

demando en la sudo. Lia anstataŭanto estis Pham Hung (1912-88), kaj la ŝtatestro de Sudvjetnamio nomiĝis Ngô Đình Diệm (1901-63). Ĉi-lastaj bojkotis la tutlandajn balotojn, kiuj estis planitaj en 1956, kaj por firmigi sian potencon li sukcesis elŝalti siajn kontraŭulojn, cetere kun usona helpo. Sub Ngo Dinh Diem estis lanĉitaj novaj kruelaj kampanjoj ne nur kontraŭ laŭdiraj malamikoj, sed ankaŭ kontraŭ Viet Minh, kiu daŭre estis reprezentita kaj aktivadis en la sudo, kvankam laŭ la ĝeneva packonvencio devus esti translokiĝinta jam delonge al la nordo. Dum la foresto de Ho Chi Minh en eksterlando – en februaro 1958 li restadis en Hindio kaj Birmo – Le Duan profitis la okazon anstataŭi liajn kunlaborantojn per propraj lojaluloj. Pri la konfuceisma mistiko de Ho Chi Minh Le Duan nur mokis, konsiderante ĝin eksmoda feŭdismo. Kiel plej signifaj partneroj de Le Duan elstaris precipe Lê Đức Thọ (1911-90), Tran Quoc Hoan (1916-86) kaj generalo Nguyen Chi Thanh (1914-67). En somero 1958 Ngo Dinh Diem lanĉis vastan kontraŭ-komunistan kampanjon, tiel ke en malmulta tempo miloj da personoj estis arestitaj, malaperigitaj aŭ likviditaj. Aliflanke, Ho Chi Minh komencis paroli pri “demokratiaj metodoj”, sed malgraŭ tio ekde 1960 al specialaj edukejoj estis senditaj ĉirkaŭ 6000 personoj, kiuj kontraŭstaris la “konstruadon de la socialismo” en Vjetnamio. Precipe teruraj kaj malhomecaj estis la malliberejoj, koncentrejoj kaj lagroj de Vjetnamio, kiuj troviĝis en izolitaj kaj malfacile alireblaj lokoj en la montaro kaj arbaro. Ho Chi Minh sendube devis scii pri ilia ekzisto.

Vjetnamio dum la ĉin-sovetia konflikto

Kiam fine de 1959 eksplodis la konflikto inter Moskvo kaj Pekino, la situacio por Vjetnamio fariĝis eĉ pli komplika. Ho Chi Minh turismis kiel diplomato kaj pacperanto inter Ĉinio kaj Sovetunio, sed Mao Zedong (1893-1976) ne estis interesata cedi sian superecon en tiu precipe ideologia kverelo inter la du komunismaj ĉefpotencoj. La situacio akriĝis post la eksplodo de la krizo ĉirkaŭ Kubo, post la perforta translokado de la kamparana popolo ene de norda Vjetnamio, la fondo de la Nacilibera Fronto de Sudvjetnamio kaj la plimultiĝo de usonaj konsilistoj en Sudvjetnamio. La membroj de la vjetnama komunisma partio displitiĝis en porsovetiaj/reviziismaj kaj porĉinaj/maoismaj frakcioj. Klopodante resti neŭtrala en la soveti-ĉina konflikto, Ho Chi Minh estis konsiderata kiel ŝanceliĝema kaj tro kompromisema, krom tio kiel tro maljuna. Do, li perdis sian influon pli kaj pli. Al li oni krome riproĉis, ke li restis tro hezitema en la reunuiga procezo. En la partio mem ŝajne venkis la radikaluloj. Dum Vo Nguyen Giap, la ministro pri defendo kaj amiko de Ho Chi Minh, estis arestita, Le Duc Tho, la fidulo de Le Duan, postulis en la gazeto *Nhan Dan* senkompromisan konduton kontraŭ la “dekstraj devojiĝantoj” kaj “reviziistoj”. Li garantiis malmolan trakton de ĉiuj, kiuj ne intencas akcepti la validan politikon. Kiam la sudvjetnama ŝtatestro Ngo Dinh Diem estis forpuĉita en novembro 1963, Ho Chi Minh subtenis la plifortigon de la politika kaj armea premo sur la saĝonon reĝimon. Aliflanke, li avertis ke estas danĝere adopti decidojn, kiuj povus provoki la usonan intervenon. Sed Ho Chi Minh estis pli kaj pli ofte atakita kaj respondecigita pro iuj eraroj, kiuj laŭdire kaŭzis la malfavoran evoluon en Vjetnamio, kaj kelkaj partiaj funkciuloj konsideris sian revolucian gvidanton pli kaj pli ĝena. Iom seniluziigita pro la pezaj frakciaj kvereloj en la partio, en Kristnasko 1963 Ho Chi Minh komunikis al la sovetia ambasadoro, ke li intencas demisii de ĉiuj oficoj. Tiel, Ho Chi Minh malaperis por iu tempo kaj denove montris sin nur en marto 1964 en iu speciala konferenco, en kiu oni klopodis kovri la frakciajn konfliktojn. Li multe parolis pri paca unuecigo de Vjetnamio, aliflanke li certigis la vjetnamojn en la sudo, ke la nordo nepre subtenos ilin en ilia patriotisma lukto. Fine de 1963 estis decidite, ke oni volas atingi la reunuigon de Vjetnamio laŭ la milita vojo. Kontraŭ Sovetunio, kiu el la vidpunkto de la vjetnamaj komunistoj daŭre estis regata de la “reviziisma” politikisto Ĥruŝĉov, la reĝimo en Hanojo lanĉis akran kritikon, kvankam Ho Chi Minh avertis, ke tio ne estas bona. Studentoj el “reviziismaj” komunismaj landoj estis resenditaj en siajn hejmlandojn kaj interne estis organizita nova kampanjo kontraŭ “reviziismaj” verkistoj, muzikistoj, reĝisoroj.

Vjetnamio en nova milito

Kiam en aŭgusto 1964 en la Tonkina Golfo laŭdire estis atakitaj iuj usonaj militŝipoj, prezidento Johnson ordonis la detruon de diversaj celoj en Nordvjetnamio. Tiel, ekde februaro 1965 la lando denove estis sisteme atakita per bomboj. Krom tio, en marto aperis la unuaj usonaj trupoj ĉe la bordo de Danang.

Nova milito en Vjetnamio komenciĝis. Kontraŭ la teknologie altnivela milita potenco de Usono la pli modesta armeo de la Vjetnama Demokrata Respubliko nature havis neniun ŝancon.

En Sovetunio, la iom nekalkulebla “reformemulo” Ĥruŝĉov estis forprenita de la potenco en oktobro 1964 kaj anstataŭita de Leonid Iliĉ Breĵnev (1907-82), kiu fariĝis la nova ĝenerala sekretario de KPSU. Li kaj Aleksej Kosygin (1904-80), la nova ĉefministro, atribuis pli grandan atenton al la vjetnama problemo ol faris tion iliaj antaŭuloj. Dum sia vizito al Hanojo en februaro 1965 Kosygin promesis ampleksan helpon per militmaterialo.

En tiu nova krizo Ho Chi Minh akiris novan rolon. Nome, li fariĝis la ĉefa malamiko de Usono, kiu probable supertaksis lian influon ene de la komunisma partio. Sen en Vjetnamio mem Ho Chi Minh fariĝis objekto de personkulto: Li estis nomita Nguoi (“la homo”) kaj per tio ricevis titolon, kiun neniu alia vjetnama politikisto portis. La usona prezidento Johnson nomis lin “Old Ho”. Sed kvankam Ho Chi Minh estis internacie respektita kaj mitigita kiel “ikono de la revolucio”, ene de la vjetnama komunisma partio lia marĝenigo ne finiĝis, despli ke lia sano rapide malboniĝis. Praktike li ne plu kapabls gvidi la registarajn laborojn, kaj la politikistoj ĉesis ĉiutage konsulti liajn konsilojn. Lia funkciado limiĝis al la vizitado de lernejoj, fabrikoj kaj armeaj trupoj, por altigi la moralon de la popolo. En majo 1965 li festis sian 75an jariĝon, sed li jam pensis pri la morto. Li deziris esti kremaciita kaj volis, ke lia cindro estu enterigita sur iu monto apud Hanojo. Li volis, ke ĉe la tombo estu starigita simpla dometo por la vizitantoj. Lia testamento estis subskribita de Le Duan. Poste Ho Chi Minh ŝanĝis la testamenton. Nun li postulis, ke lia cindro estu dismetita en tri urnoj, kiuj estu starigitaj po unu en norda, centra kaj suda Vjetnamio.

La morto de Ho Chi Minh

Pli kaj pli longe Ho Chi Minh restadis en Ĉinio por esti kuracita. Tie li renkontis Mao Zedong, kies militan helpon li petis. Krome, li vizitis la naskiĝlokon de Konfuceo en Ŝandongo. Alian fojon li vizitis Manĝurion. En Vjetnamio li vivis en sia modesta palisodometo. Nur dum la usona bombado li kuris en la bunkron sur la tereno de la prezidenta palaco. Li faris matenan gimnastikon, sed lia korpo rapide degeneris. Intertempe, unu membro de la politburoo veturis al Moskvo por informiĝi kiel konservi kadavron laŭ la modelo de Lenin. Ĉio tio devis resti strikte sekreta, ĉar Ho Chi Minh mem esprimis alian volon pri kio okazu kun sia korpo.

En la politburoo de la vjetnama KP regis malkonkordo rilate la strategion aplikotan kontraŭ la usona agreso. Unuj subtenis rigoran militan strategion, kio kondukus al novaj viktimoj flanke de la nordvjetnamoj, aliaj esprimis sin por pli altgrada prudento. Krom tio, en la politburoo daŭre ŝvelis la malamo inter Le Duan kaj Vo Nguyen Giap, sed Ho Chi Minh ne sukcesis interpacigi ambaŭ rivalulojn. Subite forpasis generalo Nguyen Chi Thanh, kiu apogis pli rigoran strategion kontraŭ la usonanoj. Sekve, Le Duan volis lanĉi ĝeneralan atakon kontraŭ Sudvjetnamio. Ho Chi Minh kritikis tiun ĉi planon kaj avertis, ke oni respektu la militan forton de la kontraŭulo kaj la riskon mem perdi multajn proprajn anojn. Meze de 1967 ankoraŭfoje okazis aresta ondo kontraŭ la gvidantoj de la Laborista Partio, de kiu estis trafitaj 200-300 personoj. Tiuj homoj, al kiuj estis riproĉitaj, ke ili konspiris kontraŭ la registaro de Ho Chi Minh, estis arestitaj sen proceso ĝis 1972/3. Ĉi tiu partia purigo, kiu okazis kiam Ho Chi Minh restadis en Ĉinio, kondukis al malvarmiĝo de la klimato ene de la partio. Dume, la nordvjetnamoj lanĉis militon kontraŭ Sudvjetnamio. Al Ho Chi Minh, kiu kuŝis en la lito en Pekino, la milito estis ‘vendita’ kiel granda sukceso, sed la realeco estis tute alia. Inter alie, la popola ribelo, je kiu oni esperis, ne okazis, kaj en Sajgono daŭre troviĝis la registaro, kiu estis apogita de Usono. En aŭgusto 1969 Ho Chi Minh kaptis bronkiton kaj suferis korinfarkton. Ĝuste la 2an de septembro, en la tago de la 24a datreveno de la proklamo de la Nacia Sendependeco de Vjetnamio, la koro de Ho Chi Minh ĉesis bati.

Lia forpaso estis diskonigita la 4an de septembro kaj lia oficiala mortodato fiksita je la 3a de septembro, ĉar oni volis eviti, ke ĝi kongruu kun la nacia festotago. Lia korpo estis enbalzamigita kaj prezentita kun la tradicia kakikolora ĉemizo kaj la plastikaj sandaloj kaj kuŝis en vitra sarkofago. Lia testamento estis falsita kaj laŭlegita de Le Duan kun modifoj. Okazis pompa funebra ceremonio, partoprenata de multaj eksterlandaj gastoj. Poste oni decidis starigi maŭzoleon. Ĉi tiu konstruaĵo estis inaŭgurita en aŭgusto

1975 – kelkajn monatojn post la venko de Nordvjetnamio super la sudvjetnama reĝimo. Nur en 1990 oni klarigis, kial la plej lasta volo de la prezidento estis malrespektita. Kaj la enbalzamigo estis farita kaj la maŭzoleo konstruita, ĉar oni volis ebligi al la homoj de Vjetnamio, ke ili povu honori kaj omaĝi sian unuan prezidenton kaj revolucian gvidinton. Kaj ne Hanojo, kie staras la maŭzoleo, sed Sajgono fariĝis Ho-Chi-Minh-urbo.

Ho Chi Minh post sia morto

La morto de Ho Chi Minh kaŭzis en Vjetnamio ondon de ikonigo. Unue, la partiaj ideologoj kaj la ŝtataj eldonejoj rigore atentis pri tio, ke la oficiala biografio de Ho Chi Minh estu strikte respektita kaj ke diversaj tabuaj temoj – ekzemple lia privata vivo kaj la historioj kun liaj edzinoj – ne estu tuŝitaj. Ho Chi Minh estis proklamita kiel grava teoriisto de la marksismo-leninismo, kvankam tio estis evidenta troigo. Liaj instruoj estis utiligitaj eĉ kiel moralpredikoj en la lukto kontraŭ la korupcio. Kvankam ekde la periodo de la reformpolitiko (Đổi mới) de la 80aj jaroj en Vjetnamio eblas ankaŭ esprimi limigitan kvanton da kritiko pri iuj politikaj kaj historiaj temoj, la reĝimo en Hanojo celas nepre eviti, ke ‘la tuta vero’ pri Ho Chi Minh estu diskonigita. Por ne makuli la bildon de la ‘nacia sanktulo’, ĉiuj provoj, kaj de vjetnamaj kaj eksterlandaj biografoj, tuŝi tiklajn temojn, inter ili ankaŭ la marĝenan signifon de Ho Chi Minh en la internacia komunisma movado kaj lian izolitan ekzistadon en Sovetunio en la 30aj jaroj aŭ lian ambivalentan kaj dubindan rolon kiel revoluciulo kaj politikisto en la vjetnama KP, estas daŭre severe persekutitaj kaj punitaj.

Malgraŭ tio, Ho Chi Minh sendube ludis elstaran kaj centran rolon en la historio kaj politiko de la moderna Vjetnamio ĉefe kiel motoro de la vjetnama sendependeco kaj simbolo de la reunuiĝo. Lia supertaksado kaj idealigo kiel revoluciulo kaj teoriisto tamen devas esti farita samtempe kun pentrado de pli nuancita bildo, kiu pli konformus al la volo de Nguyen Sinh Cung aŭ Nguyen Ai Quoc aŭ Ho Chi Minh, kiu esence estis modesta kaj pacama homo. Bedaŭrinde, ĉar li estis tro ŝanceliĝema kaj kompromisema tipo, li verŝajne ne sukcesis eviti la perfortajn ekscesojn, kiuj estis faritaj de agresemaj armeaj gvidantoj en Viet Minh kaj de fanatikaj ideologoj en lia komunisma partio, kio arbitre kaj ripete kaŭzis sennombrajn senkulpajn viktimojn, ĉar krudaj politikistoj misuzis sian povon. Inter tiuj viktimoj troviĝas ankaŭ centoj da kritikantoj, disidentoj kaj opoziciuloj, sed ankaŭ membroj de etnaj kaj religiaj komunumoj, kiuj estis persekutitaj kaj kondamnitaj al multjaraj arestpunoj kadre de maljustaj juĝprocesoj. Ĉi tiu tradicio de la komunistoj estas daŭrigita fakte ĝis nun.

La amara ironio en la tuta historio estis, ke ne Ho Chi Minh, kiu daŭre pledis por la paco, ricevis la nobelpremion en 1973, sed Le Duc Tho kune kun Henry Kissinger, kiuj intertraktis por atingi la pacon en Vjetnamio. Le Duc Tho rifuzis la premion kun la argumento, ke en lia patrujo paco daŭre ne regas.

Laŭ artikolo publikigita de Ĉina Radio Internacia, Ho Chi Minh interesiĝis pri Esperanto kaj eĉ iom povis paroli ĝin (inter 1914 kaj 1917).

* * * * *

© A. Künzli, lic. phil. Bern, Svislando
www.zamenhof.ch, www.planlingvoj.ch

unuafoje publikigita en Julio 2012 sur www.planlingvoj.ch

Originale verkita en Esperanto en printempo 2012 laŭ: Martin Grossheim: Ho Chi Minh. Der geheimnisvolle Revolutionär. C.H. Beck. München 2011. 190 p.

La nomoj de Ho Chi Minh kaj aliaj vjetnamaj politikistoj estas lasitaj en la kutima internacia ortografio (ĝenerale tamen sen la tipe vjetnamaj supersignoj, kun kelkaj specimenoj por montri la originalan ortografion).